

Jeune Esperanto Info

Magazine de l'association Espéranto-Jeunes : JEQ-Informas
Trimestriel • n°2007/1 • 2 €



Muzika numero

- festo.esperanto-jeunes.org
- artista.ikso.net/eurokka
- muzikamu kun ni



Enhavo / Sommaire

Édito **p. 3**
Brèves **p. 4-5**

En Francio / Vie de l'association

Une semaine dans la peau d'un
deĵoranto **p. 6-7**
Les contacts chez JEFO **p. 27**

Komputado

Kompreni retmesaĝon **p.10**

En la mondo / raportoj

IS, mia unua renkontiĝo **p. 11**
Kion signifas AS? **p. 25-28**

Speciala numero : muziko

Esperanta muziko en la dua jarmiko **p. 12-17**
Intervjuo kun Dolchamar **p. 18**
Pafklik-koncerto **p. 18**
Pli ol neniuj, unupersonaj **p. 19**
Initialoj DC **p. 20-21**
Piratado kaj sabotado de
Esperanto-muziko **p. 22-23**



La brochure *Espéranto Mode d'Emploi* est arrivée !

C'est un petit carré de papier dans lequel les espérantistes français peuvent mettre tous leurs espoirs de faire connaître notre langue. Vous avez dès maintenant la possibilité de faire connaître l'espéranto avec ces 36 pages qui ne manquent pas d'arguments.

La première partie de la brochure présente les rencontres, la musique, les livres et l'enseignement de la langue. La deuxième partie consiste en une réédition du célèbre *pack-eo*¹. Il s'agit d'un cours express de 16 pages qui se paie le luxe de vous fournir des petits exercices et un mini-lexique !

La valeur ajoutée de cette brochure se trouve aussi dans la présence au milieu de la brochure du DVD *Esperanto Elektronike*, la dernière création de l'association E@I, Esperanto ĉe Interreto, celle-là même qui avait été à l'initiative du CD-rom *Lernu!*.

Ce DVD comprend le contenu du CD *Lernu!* auquel sont ajoutés une centaine de livres de la *eLibrejo* (bibliothèque en ligne) en version PDF, l'encyclopédie Wikipédia en espéranto ainsi que d'autres surprises (films, musiques, etc.).

Le meilleur arrive lorsque l'on annonce le prix de cette petite merveille puisque *Espéranto-France* commercialise cette brochure au prix de 5 €, ce qui n'est rien lorsque l'on considère qu'*UEA* le vend à 9 € sans brochure. Les clubs pourront en plus profiter d'un rabais supplémentaire car la brochure (avec son DVD) ne sera facturée que 30 € les dix exemplaires et 140 € les cinquante exemplaires.

¹ Vous trouverez la version originale du *pack-eo* (ainsi que sa traduction en douze autres langues) sur le site de la Fédération Espéranto Bretagne <http://esperanto.bretonio.free.fr/pakeo.htm>



Édito

Bon, on connaît la musique, je ne vais pas vous jouer de pipeau, ce numéro de JeunEsperanto infos va vous déboucher les oreilles. On va y parler de sons, de musique, d'artistes et de belles mélodies. La musique en espéranto est très vaste, c'est le moins que l'on puisse dire.

Flo' nous a écrit une formidable rétrospective de la production musicale de ces dernières années et on voit toute la diversité culturelle qu'apporte l'espéranto. Ludivine va nous faire découvrir le dernier album de Martin Wiese, le chanteur du groupe Persone et Aleks nous fait l'honneur d'interviewer Eric Languillat du groupe Initialoj DC.

J'espère que ces articles vont vous donner envie d'acheter et d'écouter la musique en espéranto car les artistes ne vivent que si on les écoute. Et pour les écouter, la meilleure occasion est de participer à Festo à Montoire-sur-Loir que Louise et Cyrille coorganisent avec Eurokka, association dont l'objectif est de promouvoir la musique en espéranto, ce qui tombe bien, vu que c'est le thème de la rencontre ; plusieurs groupes et chanteurs sont déjà au programme.

Dans ce numéro vous découvrirez aussi un article d'Olivier Faurax qui vous expliquera les mystères de l'informatique, Alexandre Raymond nous parlera de son premier voyage à IS,

François Parchemin nous parlera de son expérience d'Expolangues et de son séjour en Bretagne. Plusieurs personnes ont réagi à l'article sur l'EPR du précédent numéro et c'est un réel plaisir de pouvoir publier les réactions.

N'hésitez pas à nous écrire pour nous faire part de vos avis sur les articles ou si vous souhaitez parler d'un sujet qui vous tient à coeur. Le prochain numéro sortira dans trois mois avec pour thème «Goûts et Saveurs».

Bonne lecture !

Axel Rousseau

Le mot du président

C'est avec grand plaisir que je vous retrouve une nouvelle fois dans les pages de JeunEsperanto Info. Peut-être aurais-je préféré repousser d'un jour la date de clôture de la revue puisque se sera déroulé d'ici à ce que vous la receviez le conseil d'administration au cours duquel d'importantes décisions seront prises. Nous ne manquerons pas de vous informer que ces décisions concernent les t-shirts, le site Internet et autres projets en cours.

J'en profite pour indiquer que l'avis de nos membres qui ne siègent pas au conseil d'administration est très important et qu'il ne faut pas faire la confusion entre «komitatanoj» et «aktivuloj». On peut très bien être actif en dehors

du CA, pour aider sur tel ou tel projet.

J'ajouterais également que tous nos membres sont essentiels par le soutien qu'ils nous apportent. Au-delà des avantages matériels que l'association apporte (revue, listes de diffusion, virements internationaux, etc.), adhérer à Espéranto-Jeunes c'est avant tout soutenir les actions de l'association (cours Internet, calendriers, t-shirts, édition de BD...).

N'oubliez donc pas de ré-adhérer pour 2007 !

François Parchemin





Les Bretons s'inspirent de la verda stelo

L'Office de la langue bretonne vient d'éditer ar « *pilhennig* », une épinglette à porter lorsque l'on est bretonnant. Elle permettra ainsi de savoir en un clin d'œil si votre vis-à-vis parle breton. L'office dit s'être inspiré des Gallois, mais sur le stand d'Expolangues nos amis bretons ont immédiatement comparé cette épinglette à la verda stelo!

Cette entreprise vise à aider à la conservation de la langue bretonne puisque le plus souvent de nombreux brittophones s'adressent mutuellement la parole en français alors qu'ils pourraient échanger en breton s'ils savaient que leur interlocuteur est brittophone.

L'épinglette, politiquement neutre car il ne s'agit pas d'un visuel qui montre son attachement à la Bretagne, mais simplement une compétence linguistique.

www.ofis-bzh.org

Avantaĝoj de urbĝemeligo per Esperanto

Eble ne ĉiuj scias, ke en marto 2005 la urbestroj de Herzberg (germana urbeto apud Hanovro) kaj de Gora (Pollando) renkontiĝis kaj surbaze de decido de la respektivaj urbaj konsilantaroj deklaris la du urbojn ĝemeligitaj kaj fiksis ke la reciprokaj oficialaj rilatoj okazos per Esperanto. Al tiu ĉi senprecedenca iasence eĉ sensacia rezulto kontribuis la agado de la Esperanto-societo en Herzberg.

Ne temas nur pri surpapera decido, ĉar ek de la menciita dato la kunlaboro inter Herzberg kaj Gora akiris tre konkretajn formojn.

Ekzemple en somero 2005 la E-societo en Herzberg du semajnojn gastigis kaj trejnigis sep instruistinojn el Gora, kiuj poste vastaskale instruis la internacian lingvon en sia urbo. Plej originale estis samjare la dusemajna internacia Arbara Lernejo apud Herzberg, dum kiu multaj infanoj el ambaŭ landoj plibonigis sian Esperantan lingvoscion.

La sama iniciativo ripetiĝos en 2007 kun la partopreno de trideko da gelernantoj kaj geinstruistoj.

Alia aspekto de la ĝemeligo estas la multnombraj kursoj de Esperanto okazantaj en ambaŭ urboj.

Ĉu ne temas pri modelo de internacia kunlaboro, kiun oni devus imiti?

Por pliaj informoj : www.ic-herzberg.de

Amikumu.com

Chuck Smith a encore frappé ! À peine vient-il de lancé *eklaboru.com*, un site qui vise à mettre en contact des employeurs et des espérantophones en recherche d'emploi, qu'il a créé en janvier 2007 *amikumu.com*.

Amikumu.com est un projet pour le moins sympathique puisqu'il consiste à mettre en contact des espérantophones sur la base de différents critères.

Vous souhaitez trouvez des amis espérantophones passionnés par le je de go ou la cuisine ? Cherchez ces critères dans leurs centres d'intérêt. Vous souhaitez retrouver une personne rencontrée à une rencontre espérantophone ? Elles servent aussi de référent ! Et vous pouvez également partager vos photos...

Le plus de ce site reste sans contexte la carte où l'emplacement de vos nouveaux amis est indiqué de manière très précise.



Il ne vous reste plus qu'à obéir à l'injonction du site : « *Ĉu vi ŝatus trovi interesajn esperantistojn apud vi?* » ... aŭ « *vidi la mondon per aliaj okuloj?* »

Nun vi povas fari tion per la unua interkona retejo en Esperanto, Amikumu! Fote kaj skribe esprimu vin kaj influu la mondon, la sola limo estas via imago... Ni nun havas 724 membrojn en 70 landoj kaj 1811 fotojn. Venu kaj amikumu kun ni !

site : <http://www.amikumu.com/>

Illustration également ici :

<http://citie.blogspot.com/2007/02/amikumu.htmlVV>



En nia antaŭa numero (JI 2006/4) ni publikigis artikolon pri la projekto konstrui la unuan francan EPR-reaktoron. En tiu-ĉi numero, ni prezentas al vi kelkajn argumentojn kontraŭ tiu projekto.

1- Ĉu necesas konstrui novan nuklean bombenegon, la EPR, en Francio?

NE! Francio ne bezonas plian atomcentralon. En Francio estas pli da energio produktata ol konsumata. Pli ol 16% foriras eksterlanden (kun monperdo), tio reprezentas produktadon de 10 bombenejoj.

2- Ĉu la decido konstrui la EPR estis demokrata?

NE! Decido estis prenita de la ŝtato kaj EDF (Elektrado de Francio) sen konsulti la Francojn. Unu jaron antaŭ la publika debato pri EPR, jam estis decidite konstrui la EPR.

3- Ĉu EPR estas pli sekura ol la aliaj?

NE! Ĝi estas tiel danĝera kiel la nuntempa atomcentralo.

Nuklea akcidento, nukleaj rubaĵoj, nuklea poluado, ŝteloj de nukleajoj por fari bombon, atencoriskoj: daŭre ne estas proponitaj solvoj.


4- Ĉu EPR rezistus, se aviadilo falus sur ĝin?

NE! Neniel estis pruvite de la konstruantoj, kiel konstatas EDF en sektreta raporto tamen malleĝe legebla en interreto: www.stop-epr.org

5- Ĉu EPR kreos multe da laborpostenoj?

[Noto de la tradukanto: JES! Baldaŭ estos pli da policoj por protekti la atomcentralojn, pli da flegistoj por sanigi de kancero, kaj pli da tombejgardistoj...]

Pli serioze: NE, la EPR estas projekto kiu kostos 3,3 miliardojn da eŭroj; se ni investus saman sumon en la novaj



energioj estus laboroj por pli da homoj.

6- Ĉu eblas konstrui EPR kaj samtempe kuraĝigi energiŝparadon kaj kreskigi la ekologie renovigeblajn energiojn?

NE! Ne restos mono por investi aliloke. La nuklea energio produktas nur 2.5% de la energio en la mondo. Nova atomcentralo estas rindinda kaj neniel helpus!

[Noto de la tradukanto:

7- Aleks mensongas.

NE! Li fidas sian firmaon!]

Ciferoj, klarigo, pruvajoj ĉe : <http://www.stop-epr.org>

Tradukis Cyrille

Reagoj de la legantaro

Réactions des lecteurs

J'ai lu avec intérêt le numéro 2006/4 de JeunEsperanto-Info consacré aux «Novaj energioj». Bien que très incomplet il a le mérite d'attirer l'attention des jeunes espérantistes sur les problèmes environnementaux de notre époque. Mais j'ai été très surpris d'y trouver un article faisant l'apologie de l'énergie nucléaire, qui n'est ni une très nouvelle énergie ni une énergie propre et d'avenir, et encore moins bonne pour la protection de l'environnement et, de plus, action négligeable sur l'effet de serre. Le principal intérêt de cet article est sa traduction en espéranto, ce qui fait déjà un bon exercice pédagogique.

Je joins à ce courrier un petit dépliant qui vous résumera très bien les problèmes liés au développement de l'EPR et la qualité des mensonges dont on abreuve le bon peuple, grâce à la toute puissance des médias. Alors si même vous vous y mettez, où allons-nous?

Bien qu'à la retraite, je suis un «jeune» espérantiste, puisque j'ai commencé l'apprentissage de cette belle langue depuis quelques mois seulement.

Bernard Mayor (Lozère)

Pour en savoir plus : www.sortirdunucleaire.org

Si vous souhaitez réagir à propos d'un article, vous pouvez envoyer un message à : **ji-teamo@yahoogroupes.fr**

ou envoyer votre courrier à :
Espéranto-Jeunes
4bis, rue de la Cerisaie
75004 Paris
FRANCE

Se vi deziras reagi pri artikolo, bonvolu sendi retmesaĝon al : **ji-teamo@yahoogroupes.fr**

aŭ leteron al:
Espéranto-Jeunes
4bis, rue de la Cerisaie
75004 Paris
FRANCE



Paršo, Manu et Aleks

quelques Gaston et un lot d'affichettes qui firent fureur. C'est un habitué des lieux. Elizabeth, Aleks et Michèle sont là aussi... Notre petite campagne en faveur de l'espéranto peut commencer.

Le premier jour est réservé aux professionnels, ce qui ne facilite pas les choses. Les premières discussions sont hésitantes mais on ne tarde pas se débrouiller. Contrairement à ce que j'aurais pu penser le public est intéressé, de très nombreux (surtout nombreuses d'ailleurs) enseignant-e-s de langues viennent nous voir et affichent leur soutien à l'idée de l'espéranto. Ce sont le plus souvent des professeurs d'anglais ou de FLE¹. Malgré le fait que la demi-heure de cours d'Axel ait été placée lors de cette journée professionnelle une petite dizaine de personnes viennent se familiariser avec la langue de Zamenhof en fin d'après-midi.

Expolangues :

une semaine dans la peau d'un «dejoranto»

Vous avez toujours rêvé de savoir ce qu'est «participer à Expolangues» ? Plus trépigant qu'un film d'action, plus «anglema» que le British Council mais moins médiatisé que le salon de l'agriculture, découvrez le salon des langues à travers les yeux d'un «dejoranto» que rien n'avait préparé à cela.

Plus commercial que la Fête de l'Huma et plus international que l'Agorasso d'Aix-en-Provence, Expolangues reste le meilleur lieu pour acquérir l'expérience du sacro-saint «esperanta budo».

Manu m'avait demandé de venir l'aider pour installer le stand... Le rendez-vous était pris mardi à 18 heures. J'allais découvrir ce qu'était la vitrine de l'espéranto en France, le fameux stand d'Espéranto-France à Expolangues, et j'allais même le découvrir de l'intérieur...

Avant la bataille

Rendez-vous mardi soir à la Cerisaie, rangement du matériel dans deux gros sacs sans compter le présentoir métallique que nous démontons. Dépliants, calendriers et livres pèsent leur poids et nous nous apercevons

vite que c'est en taxi qu'il nous faudra rallier le Parc des expositions de la Porte de Versailles.

Remontage du présentoir métallique, rangement des livres et présentation des «varbiloj»... En quelques minutes le stand sera prêt demain matin. Dernière chose à savoir : notre efficacité sur ce stand ne se compte ni en nombre de livres vendus, ni en volume de calendriers distribués mais en nombre de contacts recueillis. L'objectif est donc de collecter un maximum de coordonnées pour orienter nos ouailles vers les cours de la Cerisaie.

Premier jour, premiers contacts

J'arrive mercredi matin, un troisième loustic s'est greffé à notre équipe : Laurent est arrivé avec le ravitaillement pour quatre jours,

Les voisins


Notre stand n'est pas trop mal situé, nous ne nous trouvons pas trop loin des provençalisans et des bretonnants² qui sont tout acquis à l'espéranto! L'Ofis ar Brezhoneg³ s'est même inspiré d'une institution espérantiste : la verda stelo en créant ar «Spilhennig», une épinglette à porter sur sa veste signifiant que l'on parle breton.

Il est également amusant de voir Tintin en provençal et Titeuf en breton. Parmi les autres langues présentes il y a les petits stands (letton, hébreu, arabe, portugais...) et les grands (espagnol, chinois, russe, catalan, basque...) et bien sûr l'anglais, systématiquement présent chez tout un tas de vendeurs de méthodes et autres séjours linguistiques hors de prix). Des stands amusants relatifs à la langue des signes ou la traduction automatique par

1. Français Langue Étrangère

2. Ce qui fut pour moi assez amusant, puisque ce sont mes deux régions d'origine (voir «Mirinda Bretonio», dans ce même numéro)

3. Office de la langue bretonne



ordinateur sont aussi présents mais nous sommes avant tout dans un salon où les langues sont un marché juteux.

Nos meilleurs arguments

Mais revenons à notre petit espéranto qui cherche sa place au milieu de ces grandes langues... Sur le salon nous sommes les seuls à aborder les gens, qui restent finalement écouter nos arguments parfois durant de longues minutes très attentivement. Je vais essayer de tracer ici un dialogue type lors d'Expo-langues :

Je tends un dépliant en annonçant « *L'espéranto, pour communiquer dans le monde entier sur une base neutre !* » Si la personne reste auprès du stand et ouvre le dépliant, c'est positif. « *Vous connaissiez déjà ?* » La réponse la plus fréquente sera « *Oui, ou encore mon grand père m'en a parlé, j'ai commencé à l'apprendre il y a soixante ans, je croyais que ça n'existait plus, etc.* » Dans tous les cas prenons ça comme une réponse positive.

À la question « *Vous en pensez quoi ?* » la réponse automatique sera « *C'est un beau projet* ». Il ne vous reste plus qu'à placer « *Notre association organise des cours, si vous êtes intéressé nous pouvons vous envoyer une invitation...* » Après trois réponses positives, votre interlocuteur ne pourra vous refuser de vous laisser ses coordonnées !

Bien sûr cette efficacité optimale ne viendra qu'après une certaine pratique et avant cela vous pourrez répéter de nombreuses fois vos arguments les plus

efficaces (vocabulaire d'origine européen mais grammaire neutre et régulière qui rappelle certaines langues asiatiques, valeur propédeutique, neutralité politique et avantage pour l'Europe, etc.).

Nos meilleurs clients

Parmi les personnes venues sur le stand, notons quelques personnes de la commission européenne ou du ministère de l'éducation, quelques journalistes ainsi que le linguiste François Grin. En plus des professeurs, plusieurs bibliothécaires ou libraires sont venus s'informer et réclamer des conseils sur des choix de livres. Mais ceux qui m'ont le plus marqué ne sont pas ceux là mais ceux qui s'en aucun doute se mettrons très vite à apprendre l'espéranto. Citons par exemple ce jeune homme arrivant sur le stand et annonçant qu'il était venu à Expolangues spécialement pour nous ! Avec son copain indien, il cherchaient une langue de communication efficace et rapide à apprendre. Bredouiller en français, anglais et hindi ne leur suffisait visiblement plus. Autre exemple marquant, celui d'un étudiant qui n'avait jamais entendu parlé de l'espéranto et qui après lui avoir présenté la langue et lui avoir montré un JI, voulait adhérer à Espéranto-Jeunes sur le champ !

Fin de salon, le travail n'est pas fini

Avec la fin de la semaine les recrues arrivent : Monique, Pascal, William, Julia, Sébastien... Cela me permet de retourner à la Cerisaie où des réunions de travail m'attendent... Je laisse aux autres le soin ranger le stand après ces quatre jours de salon. Le travail n'est pas pour autant terminé puisque dès lundi (n'allez pas croire que j'ai eu droit à ma journée de repos hebdomadaire, je représentais Espéranto-Jeunes lors d'un conseil d'administration d'Espéranto-France) je commence à relancer les 172 personnes qui nous ont laissé leurs coordonnées. Il s'agit d'indiquer par courriel les horaires de la réunion d'information mais

aussi de répondre au mieux aux questions les plus diverses que nos visiteurs ont pu nous poser. Comme les étrangers étaient nombreux sur ce salon, il s'agit le plus souvent de transmettre les coordonnées d'autres sections nationales d'UEA⁴.


Mardi, il ne me restait plus qu'à envoyer les mêmes informations par courrier postal à ceux qui ne disposaient pas d'adresse courriel et d'orienter les provinciaux vers les associations locales correspondantes à leurs régions⁵. Voilà, la boucle est bouclée. Nous sommes mardi soir et j'achève ce compte rendu. Je suis un peu fatigué mais très content de l'avoir fait. Reste à savoir maintenant si nombreuses seront les personnes à venir à la réunion de présentation...

Parŝo

Je remercie tous les *deĵorantoj* qui ont supporté ces hordes de visiteurs et tous les visiteurs qui ont supportés nos arguments ainsi que bien sûr le nouveau tramway parisien sans qui je serais encore arrivé en plus en retard que je ne l'étais tous les matins.

4. Pour les curieux, les pays concernés sont, de mémoire, la Russie, les États-Unis, l'Allemagne, l'Espagne, l'Italie, la Suisse, le Québec, la République Tchèque, la Pologne, le Japon, la Chine, le Vietnam et enfin trois pays qui n'ont pas d'associations d'espéranto (Tunisie, Liban, Qatar)

5. Merci esperanto-jeunes.org/local



fotoj: Aleks Kadár



Marbordo apud Saint-Brieuc

Mirinda Bretonio

Vojaĝnotoj de Provencano en Bretonio

Mi alvenis en Bretonio preskaŭ kiel en fremda lando. Tute paradoksa sinteno ĉar miaj gepatroj estis Bretonoj kaj infane mi ofte trapasis la feriojn en Guidel, Morbihana vilaĝo apud la Laïta rivero.

Jam tiam la kultura diverseco de nia lando interesis min. Mi bone memoras kiel mi decidis lerni vortojn en la bretona por skribaĉi ilin sur miaj kajerkovriloj! Mi ne plu konas iun vorton en la bretona kaj nun parolas ian francan lingvon kun kelkfoje kelkaj vortoj en la provenca...

Ĉar mi estas verkanta memuaron pri esperantista agado mi devus intervjui aktivulojn... Kial ne fari tion en Bretonio kies esperanta aktiveco transiras regionajn limojn? Mi do venis por renkonti esperantistojn sed ankaŭ por retrovi etoson: mi lasis oliveon por buterkuirarto, sekan vegetajaron por verdaj herbejoj sen forgesi la sunon por la pluvo.

Rennes: Bretonio ĉefurbe kaj esperante

Mi do ĝojis kiam mi alvenis per rekta trajno de Marseille al Rennes (sen pariza halto!).

Ĉar estis mardo vespere, mi tuj metroveturis ĝis la loka esperantejo kie oni ludis homlupon... Post la ludo mi rapide spertis la bretonan aktivecon por esperanto: mi jam estis aktoro por la mondfama **Atendejo** kiun oni povas spekti ĉe *farbskatol.net*.

La sekvontajn tagojn, mi malkovris la bretonan ĉefurbon, ĝiajn malnovajn domojn kun belaj

lignaĵoj kaj ĝian agrablan etoson. Mi nepre ne forgesis demandi ĉe la turismoficejo esperantilingvan informilon...

Amuza rakonto pri tio: kiam oni donis al mi la informilon, mi tuj demandis, ĉu multaj homoj demandas la esperantlingvan informilon, ŝi anoncis «*Mi laboras ĉi tie de nur unu semajno kaj tri personoj petis ĝin, tamen*



La remparoj de Saint-Malo

foto: Pariso

demandu mian koleginon, ŝi laboras tie de longa tempo». Mi do demandis la najbaran virinon, kiu respondis «*Ho, ne multe... entute tri personoj demandis ĝin*». Sama respondo kun alia signifo! Homoj kiuj vizitos Rennes: ne hezitu peti la informilon, tiel urbaj oficistoj sciu, ke esperanto utilas en turismo kaj eble faros pli kvalitan informilon.

Sabate mi ĉeestis la ĝeneralan asembleon de Espéranto-Rennes. Mi ĝuis lerni kiel funkcias loka klubo. Dum la kunveno mi ne povis kredi ke tiu asocio estas tiom aktiva: pluraj budoj, kursoj preskaŭ ĉiuvespere, rilatoj kun gemelaj urboj, ktp.

Aliloka turismo

De Rennes mi uzis la malmultekostan departementan busan reton por viziti l'Ille-et-Vilaine. Ĉefe Dinan kun ĝia agrabla etoso kaj bela vidpovo ĉe la valo, Dinard kun simpatia kaj mara promeno kaj finfine Saint-Malo kun ĝiaj ĉirkaŭmuregoj. Mi antaŭe vizitis Vitre kun esperantistoj...

Alian tagon, mi rapide vizitis Lorient malgraŭ la pluvego kaj renkontis S-ron kaj S-rinon Le Magadure kun kiuj mi parolis pri historio, vojaĝoj kaj bretona lingvo... S-ro Le Magadure eĉ donacis al mi esperantlingvan libron kiun li mem elbretonigis.

Lerni pri la bretona sperto por plibonigi propran federacion

Mia vojaĝo finiĝis en Saint-Brieuc, kie mi multe babilis kun S-ro kaj S-rino Clopeau. Mi tie kompletigis la konojn pri la FEB kiujn mi akiris en Rennes. Oni klarigas al mi la kotizsistemon kaj la agadoj de la FEB. Karaj bretonaj esperantistoj, ne forgesu ke via forta federacio estas ŝanco: preskaŭ kvarcent membroj, pli ol multaj landaj sekcioj de UEA! Mi esperas ke miaj tieaj spertoj utilos por mia universitata laboro sed ankaŭ por plibonigi la provencan federacion.

Antaŭ mia forveturo, mi ankoraŭ ĝuis la agrablegan naturon ĉe la maro... Sed mia vojaĝo ne estis plene finita: mi devas

foto: Parŝo

Atendejo atendas vin...

Ĉiusemajne homoj sidas sur tiu kanapo kaj atendas. Kion ili atendas?

Tion vi scios, se vi rigardos la serion **Atendejo**. Ĝi videblas ĉe farbskatol.net.



Lernu ĉion pri tiu serio de Espéranto-Rennes en <http://esperanto.rennes.free.fr/atendejo.html>

ankoraŭ partopreni la salonon Expolangues en Parizo kie mi spertos la budan zorgadon kaj viziti Strasburgajn esperantistojn.

Mi finfine deziras danki ĉiujn esperantistojn kiujn mi renkontis Bretonie (kaj eĉ gastis min, dankegon al ili):

Xavier Godivier, Elizabeth Gury-Oberthur, Isabelle Clopeau, Philippe Bérézzi, Josphe Michaud (kaj lia edzino), Tony Guyot, Christian Departe, Eléonore Jouffe, Sébastien Ferré kaj Stéphane en Rennes. Frédéric kaj Simone Le Magadure en Hennebont. Isabelle, Manjo kaj Denis-Serge Clopeau kaj Alain Gilfort en Saint-Brieuc.

Parŝo




Renaj komitatanoj



Komputilistaĵo :


Kompreni retmesaĝsystemon



Vojiro de retmesaĝoj

En tiu parto, mi imagu ke zam@uea.org volas retskribi al mi (olivier@jefo.fr).

Kio okazas ?



Mesaĝretejo (webmail)

Se vi konas laposte.net, yahoo.fr aŭ google.fr, vi povas uzi specialan retejon por sendi kaj rigardi viajn mesaĝojn.

En tiu kazo, estas tiu retejo, kiu estas via retmesaĝilo.

Retadreso

Simpla retadreso estas en tiu formo : olivier@jefo.fr

Ĝi povas esti pli malsimpla : olivier.faurax@retmesagxo-servilo.esperanto.org

En ĉiuj kazoj, estas la signo @ kiu apartigas la uzanton de la servilo.

En la unua kazo, la uzanto estas olivier kaj la servilo jefo.fr.

Unu servilo povas havi multajn uzantojn, do pluraj homoj povas uzi la saman servilon (homo1@tejo.org, homo2@tejo.org, ktp.).

Unue, por sendi mesaĝon, Zam uzas retmesaĝilon : *Thunderbird*, *Outlook*, *Kmail* aŭ *Evolution*.

La retmesaĝo iras de la Zam-a komputilo al servilo uea.org ①

Poste, tiu servilo transdonas la retmesaĝon al jefo.fr servilo tra interreto ②.

Laste, kiam mi rigardas mian retmesaĝkeston, mi ricevas la mesaĝon de la jefo.fr-servilo ③.

Dissendolistoj

Dissendolistoj estas specialaj retadreso, kiuj estas interpretitaj de la servilo. Ĝi kopias la retmesaĝon kaj sendas ĝin al la abonantoj.

Se estas dissendolistestro aŭ se la servilo estas okupita, la mesaĝo atendas en la servilo de la dissendolistoj.

El tio fontas multaj prokrasoj.

Oftaj problemoj


Ĉu vi jam ricevis mesaĝon de « Mailer Deamon » ? Jes !

Ĉu vi ne komprenis ĝin ? Ne, ĝi parolas nur la anglan.

Tiuj mesaĝoj signifas ke mesaĝo, kiun vi provis sendi ne estis sendita. La problemoj okazis dum la transdono ② inter la duaj serviloj.

Por kompreni la kialon, vi devas serĉi la liniojn : [uzanto@servilo.org] : Recipient address rejected : [KIALO] (in reply....

[KIALO] povas esti :



Kion vi volas scii pri komputiloj ? Demandu min! Mia retadreso : olivier.faurax@laposte.net

Olivier Faurax

IS: mia unua renkontiĝo

Mia unua internacia renkontiĝo okazis ĉijarsange en Germanio: mi partoprenis en IS2006.

Unuafoje mi vidas tiom multe da esperantistoj en la sama loko... Tio mirigis min, ĉar antaŭe nur ĉirkaŭ 5 esperantistojn samtempe renkontis mi.

Estis por mi la pruvo de la vereco de la esperantista movado, kiun mi vidis memokule. Antaŭe mi nur praktikis ĝin surrete.

Mia unua vizito en Esperantio ŝajnis al mi bona... Multajn personojn mi renkontis, kaj parolis kaj amikiĝis kun ili...

Vojaĝo

La 27an de decembro: leviĝo je la 4a horo kaj duono. Ah! Tro frue! La okuloj ne volis malfermiĝi kaj granda klopodo estis bezonata por tio. Sed fine je la 5a horo kaj duono mi estis en la trajno... Ek al Parizo, kie mi provadis la regionajn trajnojn inter la stacidomoj. Poste ek al Bruselo, poste Aĥeno kaj fine Kolonjo, kie mi renkontis mian karan samnomanon Aleks, kun kiu mi vojaĝis per la etaj malrapidaj ĉirkaŭirantaj trajnoj

de Germanio... Mi bezonis pli da tempo por veturi inter Kolonjo kaj IS (ĉirkaŭ 170 km) ol veturi inter Parizo kaj Kolonjo (ĉirkaŭ 500 km).

Ni finfine alvenis je la 8a horo vespere en la Kastelo de Wewelsburg, post longega vojaĝo.

La reheimiĝo estis sama, krom la fakto ke mi maltrafis la trajnon inter Parizo kaj Liono pro malfruo de la antaŭa trajno inter Bruselo kaj Parizo. Dank'al mia ĉiama blekpledo mi sukcesis devigi la francan trajnan firmaon, oferi al mi hotelan nokton en Parizo.

La vojaĝo (ire kaj revene, ĉefe revene) estis la plej aĉa parto de mia renkontiĝo. Nun mi parolu al vi pri la ĝojaj aferoj:

Programo

Ĉijare, la programo estis ja bona, sed la apuda programo (la ne-oficiala) ankaŭ estis tre plaĉema. La Katalunoj multe muzikumis ĉie: en ĉambro, en trinkejo, en koridoroj... Ankaŭ la saŭno estis tre bona, kaj tion mi esperas vidi denove en venontaj renkontiĝoj.



foto: Aleks Kadar

En la oficiala programo, estis ankaŭ plaĉemegaj aferoj, kiel la homlupludo (ludoj kiujn mi estris), aŭ la koncertoj... Dancis mi en Esperanto! Kiom agrable... La muzikojn ankaŭ mi ŝategis... Koncerton ĉiam mi ŝategas.

Ankaŭe, je la unua vespero okazis granda interkonatiĝa vespero, kaj mi ekkonis multajn moĵosojn homojn el la tuta mondo.

Postrenkontiĝa sindromo

Jus post IS mi suferegis pri la PRS (PostRenkontiĝa Sindromo): tre forta emo reiri kongresen. Ĉar mi ege bedaŭris, ĉion kion mi antaŭe faris, kaj la bonan faron kiun mi havis du mia vojaĝo en Esperantio. Esperantien mi ja baldaŭ revenu... Esperas mi... Baldaŭ en venonta renkontiĝo, kie ajn, kiam ajn...

Ek! Esperanto, Ek!

Alexandre Raymond



la kastelo de Wewelsburg, kie okazis IS, apud Paderborn



Esperanto-Muziko en la dua jarmilo

Esperanto-rok-kulturo disvolviĝis plene en la 90aj jaroj kun eksplodo de plej diversaj artistoj kaj bandoj.

La eko de tiu dua jarmilo anoncas vere abundan kaj riĉoplenan muzikan periodon por esperanto kaj el plej diversaj flankoj sentiĝas la muzika bolado... kiu premenpuŝas supren plurnombrecan da artistoj, da stiloj kaj ankaŭ kvaliton de ilia arto kaj eldonoj.

En 5 jaroj aperas preskaŭ tiom da muzikproduktaĵoj aperintaj en la 10 pasintaj jaroj!

En 5 jaroj aperas preskaŭ tiom da muzikproduktaĵoj aperintaj en la 10 pasintaj jaroj! Kaj paradokse tiu eksplodo okazas ĝuste kiam ekaperas krizo en la muzika mondo kaj en la muzika distribuado (disfalo de la vendoj en la muzika merkato pro ekonomia krizo kaj eksplodo de interreto kiu disponigas elŝuteblan muzikon senpagan).

2000 - 2001

Ni vidas aperi en la jaro 2000 la du lastaj diskoj de Kolekto 2000 eldonita de **Vinilkosmo** kun la disko **Kia viv'** de **Kore**, franca bando kun la elstara kantisto **Kris Spitzer** kaj la unua disko **Lingvo Intermonda** de **Dolcxamar** elektronika pop hip-hop bando el Finnlando.



La projekto de subgrunda muziko lanĉita antaŭ jaro aperas en la jaro 2000, plenumita dank'al la kunlaboro inter la brazila eldonejo **La blua papilio** kaj **Vinilkosmo**. La kompilo **Esperanto subgrunde** prezentas 31 titolojn de 15 diversaj bandoj punkaj kaj hardkoraj el Brazilo, Francio, Kanado kaj Ukrainio. Estis eĉ kunorganizita subgrunda festivalo en okupita ejo en Tuluzo por inaŭguri la aperon de la disko. Koncertis tie




festivaloj okazintaj **KAFE** en julio en Tuluzo (Okcitanio / suda Francio) kaj **KEF 7** en Aŭgusto en Helsinko (Finnlando). Tiuj du festivaloj donis la tonon kaj malfermis perspektivojn por la nova jarmilo...

la tuluzaj bandoj kaj por la okazo venis el Brazilo **Julio Calegari**, unu el la respondeculoj de «La blua Papilio» kaj basisto de la bandoj **Araukana** kaj **Averto al gepatroj**.

Sekvas aliaj novaj bandoj kiuj ankaŭ eldonas siajn unuajn diskojn **Sojle de la klara temp'** de la barcelona popoltradicia bando **Kaj Tiel Plu** kiu impresigis la publikon okaze de la Universala Kongreso en Montpellier en 1998, kaj **Jen venas Brokantaĵoj** de **Esperanto Desperado** fondita el la kuniĝo de la dano kaj eks-**Amplifiki**-ano **Kim Henriksen** kaj de la bosno **Amir** (bedaŭrinde la bando disiĝis, ilia lasta koncerto okazis dum IJK en Zakopane).

Kulmino en 2000 por esperanto-muziko estis riĉoplenaj



Alia grava evento por esperanto-muziko okazinta en junio 2001 estis la malfermo de la surbendigstudio de **Vinilkosmo** kiu donis la eblecon al la diskeldonejo eki propran produktadon.

Inaŭguris la studion la loka esperanta artisto **JoMo** per la surbendigo de la albumo **JoMo friponas!** ĝi ankaŭ estis la preteksto por fari pompan inaŭguron kun invito de la lokaj esperantistoj kiuj partoprenis en la registrado de pluraj titoloj eĉ la infanoj kantis sub la gvido de JoMo.

Kelkajn monatojn poste en la sama jaro la fama franca artisto **Morice Benin** surbendigis en la studio de Vinilkosmo la albumon


In-Spir', temas pri elektitaj kaj tradukitaj kantoj komponitaj de la artisto mem kiujn li kantis papage.

Sed ne nur ĉe Vinilkosmo disvolviĝas projektoj, en 2001 en Brazilo, **BEL**, Brazila Esperanto-Ligo eldonas diskon **Verdestelaj brazilajoj** de la nordorienta brazila kantisto el Fortalezo **Tarcizo Lima**, en Rusio naskiĝas sub la gvido de **Garik Kokolja** kaj produktita de REU la rusa kolekto **Oraj kantoj** kun la apero de la du unuaj volumoj **Ni renkontiĝos** kaj **Amata lando**.

Estas aparte grave iom paroli pri tiu kolekto ĉar la projekto estis tre originale lanĉita, kaj multaj Rusoj povos tion atesti. Estis lanĉita en la tuta lando enketo kaj baloto por ke ĉiuj esperantistoj en Rusio elektu la kantojn kiujn ili ŝatus enmeti en tiun kolekton, temas pri tiuj famaj tendaraj kantoj el la sovetunia epoko.

Ŝajnas ke la elekto fariĝis ege sukcesa kaj vasta ĉar la kolekto-projekto anonciĝis vere ampleksa kun 6 antaŭviditaj volumoj plenumitaj de la plej elstaraj aktualaj rusaj artistoj (gemuzikistoj, gekantistoj kaj bardoj).

En Francio la **Bretona Esperanto-Koruso** kiu naskiĝis dank' al la esperantaj regionaj kursaroj kies pinto estas la somera staĝo de Pluezec eldonis **Meven** sian duan diskon sub la gvido de **Franjo Provost** kaj de **Manjo Clopeau**.



Jomart, Nataša kaj Dj Roĝer



Persone - akustika koncerto en KEF 2000

Tjeri Faverial eksmembro de **La Kompanoj** memeldonas propran diskon **Duone** surbendigitan en lia hejmsstudio.

En Hispanio el Malago **Solotronik** (la avangarda elektronika soloartisto) memeldonas tutan kolekton de albumoj sur KD (memfarita laboro) temas pri reeldono de albumoj aperintaj sur kasedoj **Vulkano**, **Miraklo** kaj **Astral Egoency** kaj pri du kompiloj, la unua prezentas malnovajn muzikojn aperintajn sur vinilo kaj surkasedo **Kompilajo 1990 - 1995**, la dua prezentas neeldonitajn kaj remiksitajn titolojn **Kompilajo 1997 - 2001**. Li ankaŭ eldonas novan albumon **Iniciadogalileo**.

Persone de kelkaj jaroj prezentis du tipojn de spektakloj montrante la du vizaĝojn de la bando nome la elektran kaj la akustikan.

2002

En 2002 finfine la bando eldonis ĉe Vinilkosmo la albumon **Sen**, do preskaŭ senelektrna albumon, plenumitan de akustikaj instrumentoj.



En tiu jaro naskiĝas en Brazilo la unua volumo de **Brazila kolekto Tom Jobim en esperanto** produktita de **Flavio Fonseca** kun la kontribuo ankaŭ de **Alejandro Cossavella** el Argentino kaj kantisto-gitaristo de la rokbando **La Porkoj**. Tiu albumo malfermas kolekton kiu celas prezenti kantojn tradukitajn en esperanton de famaj brazilaj artistoj (Tom Jobim, Caetano Veloso, Chico Buarque, Milton Nascimento, Gilberto Gil, ktp.).

Tuj post tiu albumo aperas ĉe **BEL** alia albumo de **Flavio Fonseca** kiu kantas tekstojn verkitajn de **Geraldo Matos** (prezidanto de la Akademio de Esperanto) temas pri la albumo **Simbiozo**. Ankaŭ la brazila **Dj Roĝer** el Sao Paulo aperigas memeldonitan KD-on **Muziko Elektronika** kun pro-

praj kaj tradukitaj kantoj de aktualaj elektronikaj muzikoj.

Sekvas la apero en Rusio de la 3a volumo de la kolekto **Oraj kantoj La lingvo por ni** kaj nova disko de la bardo **Mikaelo Bronŝtejn**, memeldona disko **Esperantujo mia**.



El Hungario eldonita de **LF-Koop** aperas la unua KD de **Anjo Amika, Bela revo** kiu miksas variecajn kaj ŝlagrajn kantojn kun pli religiaj.

En Germanio **Denis Rock Tamba** afrikano de la eksbando Afrika espero eldonis la kvintitolitan solo-albumon surkasede **Afrika Nokto**.

El Novzelando aperas nova artisto, temas pri **Daphne Lawless** kun du titoloj sur ŝia dua KD eldonita ĉe eldono **Random Static Release** <http://www.randomstatic.net/lawless/eo/>

Fine de 2002 aperis la **elektronika kompilo** eldonita de **Vinilkosmo** post longega preparado... sed la oficiala apero estis anoncita en 2003... fakte la projekto naskiĝis dank'al la renkonto de **Gunnar Fisher** kaj **Flo dum KEF 2000** en Helsinko.

Gunnar fariĝis la arta reĝisoro de tiu projekto de kompilo de muzikoj elektronikaj el plej diversaj landoj kaj tendencoj (elektropopo, tekno, haŭzo, trencio, denco, drumenbaso kaj bigbito)

En tiu disko aperis la plej avangardaj artistoj kaj Djoj de la epoko (**Solotronik, Lunatiko, Dolcxamar, Andreas Viklund,**

Dj Kunar, Magnus, Dj Roĝer', Asorti, MHZ kaj Krio de Morto).

2003

2003 estas denove abunda jaro kaj alportas el diversaj landoj diversajn muzikproduktaĵojn. En Germanio el Hamburgo **Ralph Glomp** starigas propran diskeldonejon **Nigra Kato** kaj eldonas du diskojn **Jus per kares'** kaj **Dum kristnaska tempo** laŭ sia ŝatata stilo popŝlagra.

Nargis Mondjazib profesia uzbeka kantistino studis muzikon en la muzika lernejo de Samarkand, nun ŝi studas en Usono, sed intertempe ŝi jam komencis belan muzikan karieron kaj havis okazon koncerti en diversaj landoj (Kirgizio, Kazahio, Taĝikio, Hindio kaj Eŭropo).

En februaro de la jaro 2003 **Nargis** eldonis du oktitolajn kodiskojn (**Protect Love, The Water of Life**) en kiuj aperas po du esperanto-kantoj (**Piano en la nokto, Nia instruisto, Tuko, Somera mondo**, ĉi lasta de **Ĵomart**) ceteraj kantoj estas en la persa, uzbeka, rusa, taĝika, ktp.. <http://www.mnargis.com/>

El Pollando **Pendumito** anarkipunkkora bando de Lukaso Wrobel, memeldonis 6 titolan Kdon kun 2 titoloj en esperanto (**Volupt' de l' dekadenco, Eterna vivo**)

El Japanio venas la **Kompilaĵo** de **La Mevo** sur KD, kiu kompilas la tri albumojn de **La Mevo** aperintajn sur kasedo **La Nomkarto**



Kim, de Esperanto Desperado

de 1986, **Bluo** de 1991, **Vizaĝoj** de 1993 kaj la remiksitan titolon **Flava blankul'** aperintan en la unua volumo de **Vinilkosmo-Kompil'** en 1995.

El Rusio aperas la du sekvaj volumoj de la kolekto **Oraj kantoj, El malproksima helo** kaj **Mia nomo de gravas** tiu ĉi lasta prezentas nur kantojn de **Mikaelo Bronŝtejn** same kiel la nova disko de **Ĵomart kaj Nataŝa, Amu min** kaj de **Elena Puĥova, Akceptu, Mondo, nin amike!**

La fino de la jaro alportas por la kristnaskaj festoj ankaŭ la duan diskon memeldonitan de la nederlanda korusa sepopo **Akordo** la albumon **Kristnaska kordo**. Post longa periodo la unua disko **Muzikpluvo** estis elĉerpita sed feliĉe okaze de Uk en Vilno ĉi somere **Roel Haveman** pere de sia eldonejo **Tekstoj** reel-donis ĝin.





JoMo kaj la Liberacanoj en KEF - julio 2005

2004

2004 estas unu el la plej produktivaj jaroj ĉefe por **Vinilkosmo**, estis produktitaj kaj surbendigitaj en ĝia studio la albumo de **Strika Tango**, **Civilizacio**, la nova bando de **Alejandro Cossavella** el Argentino. La disko estis frukto de intensa internacia kunlaborado ebligita dank'al la evoluo de la modernaj komunik-rimedoj nome Interreto kaj radio.

Parto de la disko estis registrita en Buenos Aires kaj parto en Donnevillle kaj partoprenis en la surbendigo argentinaj muzikistoj, francaj kaj norvega (**David Emil Wicksröm** la esperanta trumpetisto). Estis tre forta sperto.

La diskon eblis eldoni rapide dank' al interreto kiu donis la eblon al la argentinanoj sekvi la faritan laboron tra la elsendoj en Tuluzo ĉe radio **Suda Kanalo** arkivitaj de la radioarkivejo de **Scott Redd** en Nebrasko (www.radioarkivo.org).

Tio tute ne estintus pensebla 10 jarojn antaŭe!

Sekvis la dua albumo de **Esperanto Desperado**, **Hotel Desperado**, kiu ankaŭ estis granda aventuro, ĝi estis surbendigita en 3 aŭ 4 diversaj studioj en Kopenhago kaj ankaŭ parto de unu kanto por la voĉo de **JoMo** en Donnevillle kaj por tiu de **Martin Wiese** en Stokholmo....

Alia albumo kies surbendigo okazis en la studio de **Vinilkosmo** en 2003 aperis nur en 2004 pro atendo de la permesoj por 5 kantoj de famaj artistoj el Francio kaj Kanado, temas pri la albumo de **Jak Le Puil**, **Mi estas** en kiu partoprenis ankaŭ **JoMo** kiel muzikisto (basgitaro, gitaro, piano, perkutiloj kaj aliaj instrumentoj).

La tuta bando **Kaj Tiel Plu** dum tri semajnoj instaligis en Donnevillle per la surbendigo de sia dua albumo **Plaĉas al mi** kaj vere estis ege plaĉa aventuro, unua semajno okazis en marto 2004 kaj la du restantaj en aŭgusto, tio aspektis kvazaŭ kataluna tendaro, kun ĉio, la muziko kaj la etoso... ankaŭ ne forgesabla sperto!



Supernova

Fine la lasta albumo eldonita de **Vinilkosmo** fine de la jaro 2004 sed kiu "aperis oficiale" en la tuta komenco de 2005 estas tiu de **Dolcxamar**, **Rebela sono**.

Kompreneble ne nur Vinilkosmo eldonis Kdojn en 2004!

En Germanio la nova afrika bando de **Denis Rock Tamba**, **La Rolls**, memeldonas albumon **Sunradio** (13) kaj **Ralph Glomp** novan albumon **Nokto iĝas tag'** kaj **Jürgen Wulff** kun la senstreĉiga muzik-albumo **La lumpiramido** ambaŭ el la eldonejo **Nigra Kato**.

Kaj **Stridel** kiu ludas en ĵaz-esperanto triopo en Svedio eldonas la Kdon **Jazesperanto**.

En Francio **Tjeri Faverial** eldonas sian duan albumon **La ŝosoj de l'utopi'** kaj La Bretona koruso **Meven** eldonas novan albumon pri maraj kantoj el la tuta mondo **Ondumoj tra la mond'**.

El Frislando (Nederlando) Kajto kiu eldonis sian unuan albumon en 1989 eldonas la 5an albumon **Lokomotivo, rulu nun!**, el Brazilo en Rio de Janeiro nova kantistino, **Vera Jordan** eldonas albumon Esperanta voĉo kun kantoj verkitaj de **Sylla Chaves** kaj el Ukrainio aperas la unua volumo **Ukrainiaj kantoj** de la ĥora ensemblo **Espero el Ukrainio** sub la gvido de **Mikaleo Linecki**.



2005 - 2006

En 2005 post la apero de **Rebela sono** Vinilkosmo enstudiigis **JoMo**n kun nova projekto kun la **Liberecanoj** kaj la tradicia muzika orient Eŭropa bando Solniĉka post plurmonata laboro rezultigis la longdaŭra albumo **JoMo slavumas** kiu aperis en la komenco de 2006.

Kaj alia projekto kiu startis antaŭ tri jaroj finplenumiĝis post somero 2006, temas pri la albumo de **Supernova**, unua KD Ekstra kun profesia muzikvideo kiun eldonis Vinilkosmo.

La somero 2006 estis riĉa en kulturaj eventoj kaj precipe kun la nova orientiĝo de la franca **FESTO** kiu iom post iom transformiĝis al festivalo kun la kunlaboro de **EUROKKA** por eble transpreni la torĉon de **KAFE**.

En **FESTO 2006** estis revelacio de novaj talentoj kun la apero de **La Pafklik** pariza hiphopa bando kiu havas grandan talenton kaj kiu estas tute promesplena... ankaŭ tie eblis malkovri **FAMo**-n kiu mem eldonis propran diskon kaj la mondmuzikan kompanion **Duobla Unu**.



Martin Wiese

2007

FESTO 2007 jam prepariĝas kaj promesas esti la kultura festivalo ne maltrafebla dumsomere 2007 en suda Eŭropo kaj espereble por multnombraj pliaj jaroj!

Aŭtune 2006 ankaŭ rusaj artistoj eldonis diskojn kun helpo de Garik Kokolija **Mikaelo Bronŝtejn**, **Printempo blujinsa**, kaj **Mikaelo Povorin**, **Verula sezono** kaj **Revula sezono**. En Stockholmo **Karina** la filino de **Ĵomart & Nataŝa** aperigis kun akompano de sia gepatroj propran albumeton **Karina kantas por vi en esperanto** okaze de IJF kaj UK en Italio, kaj NR en Germanio.



Fine de 2006 venis en la studio de Vinilkosmo **Martin Wiese** de **Persone** por finpretigi kaj miksi sian unuan soloalbumon **Pli ol nenio** Albumo por la jaro 2007.

2007 promesas esti ankaŭ interesa kun la enstudiigo ĉe Vinilkosmo de **Kore** en februaro kaj **Jacques Yvart** en majo por prepari siajn duajn albumojn.

Flakte estas pluraj projektoj en atendo en la fama eldonejo... inter ili citendas la hiphopa kompilo kun repaj bandoj kiaj **Eterne Rima** el Pollando **La Pafklik** el Parizo, **Marteno Minich** el Slovakio, **Dolcxamar** el Finnlando, **Dj Roĝer'** kaj **Antonio Moreira** la brazilanoj, **La Zinfonia** el Ĉilio, **Dj Kunar** la germano, **Paz et Baka** el SudKoreio, **Musubana** el Norvegio.

Sed ankaŭ multaj artistoj kiuj faris demojn kaj kiuj iam emus eldoni albumon, **Inicialoj DC** de la franco loĝanta en Germanio

Eric Languillat, **Krio de Morto** el Pollando, **Ĵomart & Nataŝa**, **Morice Benin** kun projekto de albumo de kantoj de **Léo Ferré**, **Duobla Unu** el Francio per sia mondmuziko, **Flavio Fonseca** el Brazilo, ktp....

Ne mankas projektoj....

Afrikaj artistoj provas siaflanke ankaŭ pliriĉigi esperantomuzikon per siaj muzikoj, **Denis Rock Tamba** de **La Rolls** kiu revenis post ekspulsado el Germanio al Kongo, **Vigla Muziko** kiuj ambaŭ konstante laboras por iam eldoni albumon en Aafriko, por Afrikanoj kaj esperantistoj en la mondo.

Théophile Mayoma kiu daŭre komponas siajn kantojn kaj kiu provas kunlabori kun diversaj artistoj (eksz. kun JoMo).

Unu el la plej belaj rezultoj de tiu persistemo de afrikanoj estas la talenta **Zhou Mack** instalita en Parizo de jam deko da jaroj kaj kiu post pluraj jaroj de malfacilaĵoj kaj provoj finfine sukcesis starigi sian bandon **Zhou Mack & La Fabo** kiuj ekfamigas lafeve.free.fr en la TTTejo estas disponeblaj por elŭto du esperanto-titoloj, sed li planas fari tutesperantan albumon de regea muziko.



Zhou Mack & La Fabo



Ĵomart & Nataŝa kaj ilia filino Karino

Ankaŭ sendepende kaj margene de eldonejoj, pluraj amatoraj artistoj helpe de la aktualaj teknikaj rimedoj per komputiloj aŭ alimaniere sukcesas fari relative kvalitatajn registraĵojn, kaj faras provojn kiel **Kader Benchelef** el pariza regiono en Francio (hip hopo), **Borje Lund** eksmembro de **Persone** el Svedio (roko), **Christian Declerck** el Antwerpen en Belgio (blusa kanto).

Aliaj preparis demojn kiel la finna bando **Manifesto Jukebox** (subgrunda roko), **MHZ** el Argentino (elektronika).

Ankaŭ aliaj disponigas siajn muzikojn en interreto en siaj personaj TTTpaĝoj kiel **Flaschen Inna Plastiktüte** el Germanio, **Herr Purpur & KC**, **Radikulo** ambaŭ el Usono, **Carlos Devizia** el Argentino.

Aliaj eldonas en limigitaj kvantoj kdojn aŭ kasedojn proprakte aŭ helpe de asocioj, **J.Dan' & Bert Schumann** el Bretonio/Francio kun la kdoj **Nune Futuren** kaj **Destino tero**, **Natalja kazimova** blinda kantistino el Taĝikio, **Espero** ensemble el Tihvin en Rusio kun la KD **Blanka nokto**, kantoturdo (**Jean-Pierre Charrier**) el Nantes (Francio) kiu realigis albumon pri Jules Verne por la jaro de Jules Verne (2005).

kaj fine aliaj provas sian arton sursceneje.... kiel la **VVĈP-oj** (La Verd-Varm-Ĉili-Piproj) skandalema roko el Francio aŭ la **Kuracistoj** flokroko el Germanio aŭ ankaŭ **Kadakar** el Britio .

Kelkaj Djoj ankaŭ remiksas muzikojn de aliaj artistoj foje kun permeso, foje ne... kiel **DJ Roĝer'** kun titoloj de **Ĵomart & Nataŝa** aŭ **Persone**, ktp...

Kio estas mirinde estas ke okazas interesaj interŝanĝoj kun la artistoj en la esperantaj festivaloj kaj renkontiĝoj pasinta **KEF** en Helsinko estis belaga ekzemplo en kiu ni trovis miksiĝo de ĉiuj artistoj por koncertoj kaj eĉ viva karaokeado, kaj tiel ni vidis muzikistojn kiuj ludis komune ĉu kun **Esperanto Desperado**, **Flavio Fonseca**, **Martin Wiese**, **David Emil Wickstöm**, **Alejandro Cosavella**, **JoMo**, **Dj Kunar**, **Dj Roĝer'**, **Dolchamar**, ktp... ankaŭ tiam miksiĝoj okazis laste dum IS. Tiaj interŝanĝoj kun artistoj kaj muzikistoj estas riĉiga kaj vivigas la esperantan muzikkulturon.

Foje ankaŭ okazas disiĝoj, kiel kun **Esperanto Desperado** en kiu la du kantistoj disiĝis kaj restarigis proprajn bandojn, **Amir** kun novaj muzikistoj daŭrigas kun Esperanto Desperado kaj Kim kun la malnovaj muzikistoj kun Hotel Desperado... ankaŭ io simila okazis al **Dolchamar** post

la foriro de la klavaristino ĉe tutmond fama metal bando.

Interese fenomenon kaj kiu impulsis la labormanieron de la artistoj sed ankaŭ de la eldonejoj estas la populariĝo de videoj en interreto, tiu intereso venis kun intrealie la fama YouTube... kaj antaŭ unu jaro esperanto interreta videoteko La **Farbskatol'** (farbskatol.net) instaligis por la pli granda feliĉo de esperantistoj, kiuj povas tie trovi ĉiuspecajn videojn kaj interalie espomuzikvideojn. Tio ja estas granda evoluo por esperanto-muziko, kiu devas adaptiĝi al novaj teknikoj kaj evolui kun ili por pli vasta riĉiĝo kaj disvastiĝo...

Ne eblas fini sen citi la gigantan laboron kiun plenumas de pluraj jaroj (DJ Kunar) **Gunnar Fischer** kompilante ampleksegan esperanto-kantaron. Kaj Ĉiuj partoprenantoj de **KEF** povis konstati ĝian utilon ĉefe okaze de la karaokea vespero!

Tutcerte aliaj TTTpaĝoj, aliaj demoj, kaj aliaj diskoj aperis kaj aperos ankaŭ, sed ni ne havas la pretendon ĉiujn koni... kaj kompreneble gravegas sciigi al ni kiam vi malkovras esperanto-artiston nekonatan.

Estus bedaŭrinde preterlasi talenton kiu povus plene kontribui al espo-muzikkulturo!

Grandparte de la menciitaj diskoj estas disponeblaj ĉe la TTTejo de Vinilkosmo:

www.vinilkosmo.com



Flo! (Floreal Martorell) EUROKKA

fotoj : Flo / Vinilkosmo

www.farbskatol.net

Farbskatol'

« ni farbu vian ekranon per neimageblaj bildoj »



Koncerto de Pafklik' en FESTO 2006

Pafklik' - koncerto

Pafklik' estas muzikgrupo kiu komencis koncerti en 2006 en la ĉevalejo de Kastelo Grezijono. Ĝi ludas hiphopon. La dua koncerto dum la Internacia Seminario 2006/07 en Germanio estis sekva paŝo al fameco. Pafklik' sukcesis dancigi kaj amuzi la homojn.

La membroj mem asertas, ke «*sub la sponsorado de Flavio Ribelo, kiu gajnis multe da mono per mensoga projekto de televido, La Pafklik' kreiĝis en 2005 en malliberejo, kie Platano kaj Katakana estis pro droga vendado kun Pichismo.*» La vereco de tiu priskribo estas disputata sed ĝi kongruas al la tekstoj de la hiphopaj kantoj, kiuj ofte ŝajnas esti memiro-niaj kaj parodii Esperantujojn.

el Vikipedio

Pafklik surbandigos 3 kantojn en Tuluz' en marto 2007 por la hiphopa kompilo de Vinilkosmo. Ĝi aldonos, dum FESTO 2007, novan spektaklon.

Jen la Pafklik!

Katakana

Alvenas ĉe la dorso kaj rompas cervikon
staras kiel urso provokas panikon
de ĉiuj elektitaj ni estas unikaj
deklaras militon al ĉiuj skeptikaj
la popoloj alvokis nin ĉar ni efikas
la mesaĝo per nia rep' amplifikas
fakte kaj reale mankas repo enbutike
do ni esprimas esperanton polemike
repas por mono ne por la plastik'
sed ĉefe ni muzikumas por la efik'
forgesu ĉiujn aliajn muzikojn
nur aŭkultu niajn mirindajn diskojn

Platano

Jen Platano jen mia lirik'
mi tre ŝatas parolaĉi sur elektronik'
tranĉas la ritmon kiel ŝuriken'
sub haŭte dolore iras ŝriken'
Ni apenaŭ ekzistas kaj ni jam estas klasik'
konataj de Ĉinio ĝis Afrik'
frenezaj ni ĵus fuĝis el klinik'
kaj per niaj vortoj vekigas la publik'
Jen murdisto tekniko
Kaj nun vi konas la Pafklikon

RK : Jen la Pafklik' ! (x5)

Katakana

Jes ja Katakana jen nomo mia
Kaj nun mi daŭros ne haltigebla
Ĉar mi certe havas multe da aferoj diredaj
Mi esprimu pri temoj revoluciemaj
Jen sincera repaĵo en mondo de fekuloloj



Ni volis intervjui la faman rokbandon «Dolchamar», sed jam antaŭ la koncerto ili tro ebriis por povi paroli. Pro tio ni prezentas tie ĉi niajn ideojn pri kiel okazintus intervjuo kun Patrik, la ĉefebrilulo de Dolchamar, se ni sukcesintus lin intervjui.

Murgazeto: Kiam venos la Finna Venko ?

Intervjuo kun Dolchamar

Patrik: Jes, ja, interese, mhm...

Murgazeto: Kiom ofte vi ludas en esperanto eventoj?

Patrik: Nu, fakte... jes... kelkajn fojojn, eble.

Murgazeto: Ĉu vi trovas ke esperantistoj estas bonaj koncertopartoprenantoj?

Patrik: Aha, aha, jes, povas esti. Ĉu?

Murgazeto: Kion vi pensas pri VVĈP?

Patrik: Hmmm, kia koloro... mmmmm uhu.

Murgazeto: Ĉu vi trovas ke alkoholo helpas al via voĉo?

Patrik: mmmmm...mmm-MMMM M

Murgazeto: De kie venas la inspiro por viaj kantoj?

Patrik: Nu, ja, aha... hmm... povus esti... interesa demando, jes... jes...

Murgazeto: Patrik, multajn dankojn

Patrik: Fakte, ĉu ne vi volas fari pliajn demandojn, ĉar mi opinias ke restas multo direda... ?

Murgazeto: Hmmm...



Iam estis rokbando kiu famiĝis fine de la pasinta jarcento en Esperantio kaj dancigis milojn da junaj esperantistoj dum pli ol dek jaroj. Tiu bando nomiĝis Persone, venis el Svedio, kaj iĝis la plej bona rokbando de la Esperanto-mondo.

Pro diversaj kialoj sed ĉefe fora translokiĝo de du membroj (unu loĝas nun en Germanio kaj la alia en Koreio), la bando bedaŭrinde disiĝis antaŭ kelkaj jaroj kaj de tiam oni neniam plu aŭdis pri ĝi...

Sed ne nur en la neesperantista muzika mondo okazas nuntempe reapero de malnovaj muzikistoj kaj reformiĝo de malnovaj bandoj. La 19an de februaro 2007 aperis la unua solo-albumo de Martin Wiese, ĉefkantisto kaj gitaristo de Persone. Necesis ĉirkaŭ du jaroj por donaci al ni tiun bonegan kaj nepre havendan diskon, kiun li verkis «*Pecon post peco dum vesperoj ĉefe hejme, eble jen unu horo, jen du...*». Li tamen ne laboris tute sole por registri la albumon, i.a. kunhelpis kelkaj amikoj el lia estinta bando Jetpilot, same kiel Anders Grop, eksbasisto de Persone, kiu ludas kontrabason sur la peco «*Rebeka*». Jen do la Talpoj, kiuj nevideblas, sed ebligis doni al la kanzonoj etosplenon.

La albumo komenciĝas per mallonga kaj trankvila kanzono «*Novembro*», kiu memorigas pri la pasinta akustika albumo «*SEN*» de la bando. Martin fakte «*volis komenci per iaspeca enkonduko kun nur unu voĉo kaj gitaro, kaj [li] tre ŝatas la efekton kiam la dua kanto eksonas poste. Iel-maniere ĝi interpreteblas kiel*

Pli ol nenio, unupersone

antaŭvorto de la albumo: se oni imagas ke «vi» en la kanto ne estas knabino sed aro da geamikoj esperantistoj... ».

Post tiu dolĉa eniro en la mondon de Martin, sinsekvas pluraj energiaj kantoj, inter kiuj la bonegaj «*Tro longe*», «*Ĉiuj en la Mondo*» kaj «*Lakto kaj Miel'*», kiuj certe plaĉegos al la delongaj fanoj de la bando. Kelkaj aliaj agrablaj surprizoj troviĝas ankaŭ en la albumo.

Martin aldonis al tiu albumo novan version de «*Vivo duras sed vi molas*» (kanzono, kiu aperis sur la dua Vinilkosmo-kompilaĵo) kaj pli energian version de «*Pli ol nenio*», kanzono el la pasinta albumo, kiu ankaŭ donas la titolon al tiu sola albumo pro du kialoj.

Unue ĉar li pensas, ke estas «*bona priskribo de la projekto*». Li ankaŭ klarigas jenon: «*Pro la manko de tempo, mi kelkfoje senesperigis pri ĉio, sed fine decidis ke mi simple faru kion mi kapablas. Se la rezulto ne perfektas, ĝi tamen estas pli ol nenio*». Kaj due, oni pripensu ankaŭ ke «*Sed estas ne» estas respondo al «Povus esti simple», «Sen» estas la unuaj literoj de la vortoj en la antaŭa titolo... kaj Pli ol nenio estas kanto de la lasta albumo... fariĝas senrompa ĉeno...*».

Pri la tekstoj, ĉiuj verkitaj de Martin, oni retrovas la kutimajn temojn: soleco, amaferoj kaj kompreneble drinkado, sed ankaŭ «*la sopiro al la kerno sub la surfacoj, la kvalitoj kiuj ne aĉeteblas, la neplanitaj, interspacaj, subgrundaj aĵoj*».

Apud la energiaj pecoj troviĝas do belaj melodioj kaj emocionaj kanzonoj. Tiu albumo povos do plaĉi al tre vasta publiko, ĉu saltemaj junuloj, ĉu pli trankvilaj homoj. Notindas finfine ke la albumo enhavas du videofil-

metojn kaj unu mp3-formatan remikson de «*Homoj kiel mi*».

Oni do povas sendube tuj mendi tiun albumon ĉar ĝi certe, malgraŭ hasta produktado, estas plej freŝa kaj valora verkajo. Oni notu ankaŭ ke Martin koncertos dum la Rodanalpa Kongreso fine de majo. Aĉetinda disko kaj ĉeestinda koncerto!

Ludivine

Aŭskultu pecojn de lia albumo ĉe www.myspace.com/martinwiese kaj spektu videon faritan ĉe Vinilkosmo en www.vinilkosmo.com aŭ farbskatol.net

Tiu albumo aĉeteblas en la butikoj de Jefe (15,50€): esperanto-jeunes.org/butik



fotoj : Flo / Vinilkosmo

Ĉe Vinilkosmo

Intervjuo kun Eric Languillat «Initialoj DC»

Ni intervjuis Eric Languillat, ĉef-kantisto kaj muzikisto de la grupo Initials DC, post lia sukcesa koncerto, dum la 50-a Internacia Seminario, en Wewelsburg, Germanio.



De kiom da tempo vi muzikas ?

Mi eklernis ludi gitaron je la 17-a jaraĝo. Kaj je tiu tempo mi interesiĝis pri gitar-herooj, malmola roko ktp. Pro tio mi interesiĝis ne pri la muziko sed pri la gitaro.

Kiel vi difinus vian muzikstilon ?

Por mi estas tre simple pop-muziko. Ĉar mi ŝatas multe pop-muzikon ĝenerale. Mi vidas ke pli kaj pli oni provas meti stilojn en pli kaj pli malgrandajn skatolojn. Tion mi ne ŝatas, ĉar mi opinias, ke muziko pli kaj pli boniĝas, kiam oni enmetas en la muzikon malsamajn stilojn.

Ekzemple por mi estis – ni ĉiam aŭdas pri brit-pop, elektro-pop ktp. Sed por mi estas stulte meti tion en skatolojn, ĉar ĉio estas simple pop-muziko. Oni povas

enmeti ĉion en pop-muzikan skatolon.

Kiuj estas viaj ĉefaj influoj ?

Fakte mi devas diri, ke influoj kaj tio, kion mi faras ne nepre estas evidentaj. Por mi, ĉefaj influoj estas *The Smith*, *New Order* kaj *Beach Boys*. Sed ekzemple kiam mi diras, ke *Beach Boys* estas granda influo, kiam oni aŭdas mian propran muzikon, oni ne nepre pensas, ke *Beach Boys* havas ian influon. Kiam mi faras muzikon, influo kaj rezulto povas esti tre malsamaj. Oni povas misgvidi homojn, se oni diras, ke ies influo estas tiu aŭ tiu ĉi. Mi jam aŭdis homojn, kiuj diris, ke tio, kion mi faras similas al *Depeche Mode*, kaj ekzemple mi ŝatas *Depeche Mode*, sed mi ne estas fano de ili. *Depeche Mode* neniel havas influon al mia muziko.

Kiuj kaŝas sin malantaŭ la inicialoj « Initials DC » ?

Fakte kiam mi komencis muzikumi sub tiu nomo, mi antaŭnelonge loĝis en Frankfurto, kelkajn monatojn. Mi translokiĝis en Frankfurton en 2002 kaj mi komencis muzikumi tie, konis neniu.

Mi opiniis, ke mi komencu koncerti sole, sed kun la ideo, ke poste povus veni aliaj homoj. Pro tio mi ne uzis mian propran nomon. Kaj je la sama tempo, amiko de mi faris muzikon sub la nomo Serge kaj samtempe mi multe spektadis la televidan serion *Twin Peaks*. En ĝi estas FBI-agento Dale Cooper. Kaj Serge Gainsbourg faris kanton *Initials BB*, do ...

Do DC estas via BB ?

Ne. Mi opiniis, ke sonas bone. Se mi farus nun, mi ne nomiĝus « Initials DC », ĉar estas malfa-

cile prononcebla de homoj, kiuj ne bone regas la lingvon. Sed mi ne volas ŝanĝi la nomon.

Kiel venis al vi la (laŭ mi bonega) ideo aldoni video-filmetojn malantaŭ vi dum viaj koncertoj ?

Mi komencis « Initials DC » sole, sed ne certis ĉu mi volos resti sole aŭ ne. Ĉiukaze la unuajn koncertojn mi faris sole kun gitaro kaj minidisc-ludilon, sed pensis ke mankas io... ambaŭ por mi kaj la publiko. Ĉar oni ne nur iras aŭdi koncerton sed ankaŭ vidi

Kaj mi mem ne estas tre distra sursceneje, do du solvoj eblis: ludi kun grupo aŭ aldoni ion alian videblan. Kion mi elektis vi jam scias. Kaj tio tiom bone funkciis, ke nun koncertumi sen la video-filmetoj estas kvazaŭ neimagebla (kaj homoj kiuj jam vidis koncertojn kun ili verŝajne eĉ plendus!).

Kiel vi elektis viajn kantlingvojn ? (la angla, la franca, Esperanto, iometete la germana)

Ĉefe pro miaj influoj. Estas tre normale kanti en la angla lingvo. Tre ofte kiam mi komencas pecon, mi komencas ĉu per





foto : www.initialsdc.net

melodio, ĉu per la angla. Sed ankaŭ kiam la formo de la kanto finiĝas, mi pensas iom pli pri la lingvo, kaj mi elektas la lingvon, kiu plej bone funkcias kun la melodio. Ĉefe mi komencas kun angla lingvo. Foje mi ŝatas la tekston, kaj konservas ĝin. Se mi ne tre multe ŝatas la tekston, mi ŝanĝas.

Unue al la franca. Mi tre ŝatas kanti en la franca, ĉar kompreneble mi bone kapablas.

Kaj la tria lingvo, kiun mi uzas, estas Esperanto. Estas aparte. Mi povas fari nur anglalingvajn kaj franclingvajn kanzonojn. Iam mi decidis traduki kelkajn kanzonojn miajn en Esperanton. Por kelkaj, ne funkciis, laŭ mi. Por aliaj, sufiĉe bone funkcias. Por ankoraŭ aliaj, tre bone funkcias. Kaj eĉ pli bone ol la originalaj versioj. Kaj mi opinias, ke mi verkis unu aŭ du en Esperanto. Sed tio ne estas normala sistemo por mi.

La interesa afero por mi : kiam mi koncertas, en Malesperantio, la kantojn, kiujn mi pli ŝatas en Esperanto-versio, mi kantas en Esperanto. En Frankfurto, mi kantas en la franca. Eĉ se homoj ne komprenas. Estas same por Esperanto. Tiel mi ĝojas diri, ke estas en Esperanto. Foje mi ne diras, kaj eble homoj opinias, ke estas franca lingvo, aŭ tute ne scias. La publiko reagas same kiel por aliaj lingvoj.

Ĉu vi havas ŝatatajn Eo-kantojn ?

Mi sufiĉe malmulte konas la Esperanto-muzikon, sed miaj plej ŝatataj pecoj estas *Junaj Idealistoj* de Dolchamar kaj *Pli ol nenio* de la akustika albumo de Persone.»

Vi muzikis dum IS 2004 en Wetzlar. Kial ni aŭdas vin tiom malofte en Esperantio ?

Mi ne estis invitita. Mi normale partoprenas kelkajn Eo-aranĝojn. En iuj mi diris, ke mi ŝatus koncerti. Sed homoj ne konas min kaj ne tiom interesigas. Kaj por mi ne tiom gravas muziki tie. Do ne gravas.

Ĝenerale mi malfrue aliĝas. Ekz. mi vidis Rolf (respondeculo pri vespera programo de IS 2006) en IJK. Li diris al mi : «Venu ludi dum IS». Nur meze de decembro, mi kontaktis la responsulon pri nokta programo kaj diris, ke venos dum 3 tagoj. Kaj se eblas mi ŝatus ludi muzikon. Kaj do por mi, ne gravas, ĉar mi pli interesigas pri loka koncertumado, kie mi loĝas, en artistaj scenejoj, kaj tie paroli pri Esperanto. Fari mian muzikon en Esperanto ankaŭ interesas min, sed ne estas mia ĉefa celo.

Min pli intereas uzi Esperanton en artistaj rondoj ol uzi mian muzikon en Esperanto-rondoj. Tiel la homoj konsideras Esperanton kiel artistan lingvon. Oni povas fari interesajn aferojn por Esperanto, interesigi homojn pri Esperanto. Aŭdigi la homojn pri la lingvo, sciigi ke homoj faras ion per ĝi.

Do ĉu ni povas diri, ke vi, tiel, male al la Esperantistaj muzikistoj, desube finvenke aktivas per muziko ?

Jes, estas bona priskribo, pri tio, kion mi faras. Por mi gravas muziko. Eĉ pli ol Esperanto. Se mi povas vekti intereson de homoj, bone. Se homoj ne ŝatas, ne gravas, mi povas tamen muziki. Mi ne bezonas Esperanton por fari mian muzikon. Sed se mi povas enmeti ĉion, des pli bone. J'aime bien utiliser l'espéranto, mais surtout pas me limiter à ça, j'veux pas que ce soit le truc principal.

Eblas aŭskulti rete la muzikon de Initials DC, elŝutante la mp3-formatajn pecojn, je : www.initialsdc.net

Kontakto : initialsdc@initialsdc.net

Intervjuis Aleks KADAR

Piratado kaj sabotado de Esperanto-Muziko

Akra krizo

De pli-malpli tri jaroj muziko suferas sufiĉe akran krizon en la mondo pro la diverseco de novaj teknologioj kiuj evoluas fulmrapide (interreto, MP3, Podkasto ktp.), kaj al tio aldoniĝas senbrida KD-kopio helpo de la pli kaj pli granda disvastigado de personaj komputiloj.

La disko-industrio nur povas konstati drastan disfalon de siaj vendoj, KD-fabrikej fermiĝas kaj maldungas sian personaron. La krizo estas grava. Kelkaj eldonejoj provas trovi alternativojn vendante unuopajn muzikaĵojn interrete, aŭ eĉ bandoj provas aperigi siajn albumojn ne plu sur KDoj sed sur USB ŝlosiloj – sed vere neniu scias kion fari kaj kio okazos al muziko en la venontaj jaroj.

Esperantaj muzikeldonejoj havas tute similajn problemojn kiel malgrandaj muzikeldonejoj ĝenerale, sed la konsekvencoj por ni estas tamen multe pli gravaj: por Esperantomuziko la problemoj estas dekobligitaj kompare al la la muziko en aliaj lingvoj. Konatas ke Esperantaj muzikeldonejoj malmultas. Unu el la ĉefaj, Vinilkosmo, jam delonge lanĉis atentigon pri la rapida evoluo de la aktualaj teknikoj kaj pri la danĝero de kopio de

diskoj kaj de elŝutado de muziko el la interreto.

La tuj sentebla konsekvenco estas la falo de la diskovendoj kaj samtempe la kresko de muzikelŝutado senpage el la interreto: la artistoj kaj muzikeldonejoj (Vinilkosmo, MusicExpress ktp.) disponigas libere du-tri muzikaĵojn de ĉiu albumo varbcele en la interreto. Kulpas pri tiu fenomeno ankaŭ la popularigo de hejmaj komputiloj kiuj ebligas facilan elŝutadon kaj kopiadon de KD-oj.

Eldoni muzikon

Eldoni muzikon ne estas simple preni la muzikon de disko kaj meti ĝin enreten...

Eldoni muzikon estas grandega laboro unue inter la artistoj kiuj elpensas ĝin, verkas, komponas kaj poste ludas, kantas kaj registras la muzikon... Por kelkaj artistoj tio postulas jarojn da senĉesaj streboj kaj sinoferoj. Poste la eldonejo kunlaboras kun la artisto por produkti, eldoni kaj distribui la artajn verkojn... kaj zorgi pri la "komerca" flanko de la muziko.

Tiu komerca flanko estas la produktado kaj eldonado de muzikoj de artistoj, kaj ĝi kostegas. Nur dank' al la vendado de la eldonitaj diskoj eblas daŭrigi la produktadon kaj eldonadon de novaj diskoj. Tiel mono investita en muzikon povas esti reinvestita por novaj produktaĵoj.

Por havi la ideon kiom kostas produkti kaj eldoni diskon jen kiel estas dispartigitaj la produktokaj eldonkostoj por, ekzemple, unu el la lastaj eldonoj de Vinilkosmo. Temas pri eldono de 1000 ekzempleroj, kaj la tuta produktokosto estas 9880€:

Suma prezo por unu KD: 15,05€ sen impostoj (vendoprezo al la publiko)



| | |
|-----------------------|--------|
| Surbendigaj kostoj: | 4,65 € |
| Mastrumado: | 1,07 € |
| Grafika laboro: | 1,01 € |
| Aŭtoraj rajtoj: | 1,06 € |
| Presado: | 1,57 € |
| Varbado: | 1,63 € |
| Tantiemoj: | 0,92 € |
| Administrado/Stokado: | 2,00 € |
| Profito: | 1,15 € |

Suma prezo por unu KD: 12,40€ sen impostoj (vendoprezo al la libroservoj kaj revendistoj)

| | |
|-----------------------|--------|
| Surbendigaj kostoj: | 4,65 € |
| Mastrumado: | 1,07 € |
| Grafika laboro: | 1,01 € |
| Aŭtoraj rajtoj: | 1,06 € |
| Presado: | 1,57 € |
| Varbado: | 1,63 € |
| Tantiemoj: | 0,92 € |
| Administrado/Stokado: | 0,49 € |
| Profito: | 0,00 € |

Plej malbona la situacio estas en la disvolviĝantaj landoj, kiel landoj de Sud-Ameriko kaj Azio (kaj ankaŭ Afriko kaj Orienta Eŭropo – Red.), por kiuj Esperanta muziko ne estas alirebla pro la altaj prezoj de la Eŭrope eldonitaj Esperanto-diskoj.

Por provi ŝanĝi tion, Vinilkosmo provis trovi solvojn kreante partneran eldonadon kun BEL (Brazila Esperanto-Ligo) por disponigi la Vinilkosmajn eldonaĵojn en Sud-Ameriko, sed, bedaŭrinde, ĝis nun sensukcese. Nun estas nova projekto starigi partneran eldonadon kun la nova strukturo, Kosmuzik en Brazilo. Sed organizi tion postulas iom da tempo kaj ĉefe mono.



Jak Le Puil kaj JoMo

Dume la situacio malpliboniĝas...

Vinilkosmo ekspertis novan fenomenon: piratado de siaj eldonoj fare de retpaĝoj, ekzemple blogoj.

Unua kiu tiel agis estis bazita en Argentino kaj tute kontraŭleĝe disponigis por libera elŝutado ses albumojn eldonitajn de Vinilkosmo kaj unu eldonitan de BEL. Tio estas tutsimple senskrupula Ŝtela misago kaj ĝi sabotadas la laboron por Esperanto-muziko kiun la artistoj kaj la eldonejoj strebas fari.

Artistoj kaj muzikeldonejoj estas intime ligitaj kaj funkcias kune, ĉar ili helpas unu la alian kaj ili bezonas unu la alian. La muziko de eldonitaj diskoj apartenas al la artistoj, kaj neniu rajtas uzi ilin por publika disvastigo krom se estas interkonsento kun la artisto/eldonejo. Estas klare ke ne eblas fari kion ajn pere de muziko kiu apartenas al artistoj, kaj certe ne eblas disponigi ĝin senpage al la publiko, sen peti la permeson de la artistoj - kaj des pli kiam la diskoj estas vendataj. Kiel vi vidis, produkti diskojn kostegas al la artistoj kaj al la eldonejo amason da horoj da laboro kaj grandajn investojn de tempo, sindonemo, pasio kaj mono.

Esperanto-muziko estas unu el la plej vivantaj partoj de Esperanto-kulturo. La eldonejoj strebas teni ekvilibron por daŭre alporti al la Esperanto-Movado kaj al

Esperanto-kulturo konstantan fluon de novaj eldonaĵoj, de novaj artistoj ktp. Piratado (ŝtelado de muziko) frakasas tiun laboron kaj povas en tre malmulte da tempo dronigi la eldonejon... Ĝi rompas la ekvilibron de la eldonejoj kaj endanĝerigas tiom la eldonejojn kiom la artistojn kaj eĉ la muzikan kulturon mem... Tial pro piratado post kelkaj jaroj eĉ la Esperanta kulturo povos rapide suferi, malriciĝi kaj kadukiĝi.

Feliĉe, ĉi-foje la artistoj, Vinilkosmo kaj ĝiaj kunlaborantoj sukcesis argumenti kaj konvinki la piratan blogiston ĉesi tiun sabotadon. Sed en alia kazo la eldonejo estus devigata interrompi sian aktivadon kaj prokrasti aŭ forlasi siajn projektojn kaj produktaj ojn en preparo por eviti bankrotecon... Neniu eldonisto prenas senkonsiderajn riskojn eldonante diskojn sen esti certa ke eblas disvendi ilin. Neniu Esperanta eldonejo havas la financajn rimedojn por riski fiaskon pro mallojala konkurenco fare de piratoj. Kiam la eldonejoj ĉesos produkti novan muzikon kaj ne plu reldonos elĉerpitajn diskojn, la piratoj malaperos ĉar ili nenion plu povos pirati, sed certe tiam jam tro malfruos. Iel dubindas ke piratoj ekproduktos Esperantomuzikon por disdoni ĝin senpage interrete.

Espereble, la situacio evoluos rapide, kaj la piratoj ĉesos aktivi kontraŭ profesie eldonita Esperanto-muziko antaŭ ol estos tro malfrue, kaj Esperanto-muziko fariĝos dezerto... Sed estu ankaŭ ege klare ke esperantisto



kiu elŝutas piratitan muzikon fariĝas komplico kaj respondecas pri la mortigo de Esperanto-kulturo kaj kontribuas al ĝia entombigo.

Nura subteno ebla estas per akiro de la originalaj diskoj eldonitaj kaj disponigitaj en la libroservoj aŭ rekte ĉe la eldonejoj. Varbcele estas libere disponebla muziko de ĉiuj albumoj kaj informojn pri la artistoj ĉe www.musicexpress.com.br/novajoj.asp kaj muzikvideoj ĉe farbskatol.net. Ĝeneralaj informoj pri Esperanto-muziko haveblas en la TTT-ejo de EUROKKA artista.ikso.net/eurokka kaj pri la artistoj artista.ikso.net.

Fine, Vinilkosmo havas sian propran retejon kie eblas rekte aĉeti diskojn enrete. Vizitu ĝin ĉe www.vinilkosmo.com.

Kompilata de Flo! (Floréal MARTORELL)

laŭ argumentoj okaze de la diskuto inter artistoj kaj aktivuloj de EUROKKA/Vinilkosmo. Kontribuis: Emilio CID, Bertilo WENNERGREN, Martin WIESE, Ferriol MACIP, Rogener PAVINSKI, David-Emil WICKSTROEM, Gunnar FISCHER, Jean-Marc LECLERCQ, Jenja AMIS, Amir HADZIAHMETOVIC, Flavio FONSECA kaj Floreal MARTORELL.

Tiu artikolo jam aperis en la *Ondo de Esperanto* 2006/12 (146) kaj en *Tejo Tutmonde*.

fotoj : Flo / Vinilkosmo



Flo kaj Triboulet, la son-inĝeniero

JEFO-estraro / bureau d'Espéranto-Jeunes

| | | |
|-----------------------------------|---|---|
| Prezidanto: François Parchemin | Chemin du Font du Broc, Quartier Ste Roseline 83460 les Arcs | tél. : +33 6 77 12 56 61 francois.parchemin@esperanto-jeunes |
| Vic-prezidanto: Mélaine Desnos | 50, rue du Docteur Léonce Basset 93400 Saint-Ouen | tél. : +33 1 40 11 31 87 melaine@esperanto-jeunes.org |
| Sekretario: Axel Rousseau | 26, rue Boussingault 75013 Paris | tél. : +33 6 63 70 11 32 axel@esperanto-jeunes.org |
| Vic-sekretario: Fabien Tschudy | 6 rue des Cavaliers 68700 Aspach le Haut | tél. : +33 6 87 20 67 31 fabien.tschudy@esperanto-jeunes.org |
| Kasistino: Julia Hédoux | 2, avenue du Bois, les Estudiales - appt 76 95000 Cergy | tél. : +33 6 17 06 80 70 julia@esperanto-jeunes.org |

JEFO-komitato / conseil d'administration

| | | |
|----------------------|--|---|
| Aleks Kadar | 13, avenue de Wagram 75017 Paris | tél. : +33 6 86 58 00 20 aleks@esperanto-jeunes.org |
| Alexandre Poulet | 9, rue Camille Saint-Saëns 95480 Pierrelaye | tél. : +33 1 34 21 99 84 |
| Benoît Fonty | 10, rue Bonne Louise 44000 Nantes | tél. : +33 2 40 69 48 95 benoit@esperanto-jeunes.org |
| Christophe Chazarein | 200, rue Ursule Devals 82000 Montauban | tél. : +33 6 84 44 20 18 christophe@esperanto-jeunes.org |
| Cyrille Poulet | 103, av. Verdier 92120 Montrouge | tél. : +33 6 77 28 13 25 cyrille@esperanto-jeunes.org |
| Isabelle Clopeau | 6 rue J.P. Calloch 22000 Saint-Brieuc | tél. : +33 2 96 94 09 75 isabelle.clopeau@esperanto-jeunes.org |
| Louise Sauvé | La Jennetierre 41100 Marcilly-en-Beauce | tél. +33 6 32 47 58 53 houbala@orange.fr |
| Olivier Dupré | 26, rue Boussingault 75013 Paris | tél. : +33 6 61 89 66 81 olivier.dupre@esperanto-jeunes.org |
| Olivier Faurax | 1 rue Jean Jaurès 13120 Gardanne | ofaurax@laposte.net |
| Pascal Leclaircie | 10, rue Jean-Jaurès 91300 Massy | tél. : +33 6 66 28 02 30 pascal@esperanto-jeunes.org |
| Sébastien Montagne | 6, résidence Pasteur, 21 rue des Ormeaux 49100 Angers | tél. : +33 2 41 41 08 23 sebastien@esperanto-jeunes.org |
| Thibaud Clouet | 20, rue Barbanègre 75019 Paris | tél. : +33 6 77 11 09 24 thibaudclouet@yahoo.fr |
| Véronique Bichon | 8 rue Chevreuil 34310 Capetang | tél. : +33 6 63 14 56 77 veronique.bichon@esperanto-jeunes.org |
| Vincent Pacheu | Vallon de la Tour de Keyrié 13100 Saint-Marc-Jaumegarde | tél. : +33 6 81 71 40 55 vincent.pacheu@esperanto-jeunes.org |

Espéranto-Jeunes
JEFO
(Junulara Esperantista
Franca Organizo)

4 bis rue de la Cerisaie
75004 Paris
Tél. 01 48 87 07 42
www.esperanto-jeunes.org
info@esperanto-jeunes.org

rédaction du journal :
ji-teamo@yahooogroupes.fr

Directeur de Publication /

Direktoro de la Eldono : François Parchemin

Rédacteur en chef / Ĉefredaktoro : Axel Rousseau

Mise en Page / Enpaĝigo : Emmanuelle Richard

Corrections / Korektoj : Renée Triolle

Couvertures / kovertoj : Ben

Photos / fotoj : les auteurs

Ont contribué à ce numéro /

Kontribuis al tiu ĉi-numero :

Aleks Kadar, Axel Rousseau, Benoît Fonty (Ben),
Cyrille Poulet (Platano), Emmanuelle Richard, Floréal
Martorell (Flo), François Parchemin (Parŝo), Ludivine
Delnatte, Olivier Faurax

Imprimerie / Presado : Ravin Bleu


Edité en mars 2007 à 500 exemplaires. Pour adhérer à Espéranto-jeunes et recevoir régulièrement ce magazine, remplissez et renvoyez le bulletin d'adhésion. Les articles parus dans JeunEsperanto Info n'engagent que leurs auteurs. Toutefois, Espéranto-Jeunes se réserve le droit de les publier ou non. Tous droits de reproduction autorisés sous réserve de l'indication de l'auteur ou de la source, et sur simple information à Espéranto-Jeunes.

Eldonita en marto 2007 je 500 ekzempleroj. Por aliĝi al JEFO kaj regule ricevi tiun bultenon, plenigu kaj sendu la aliĝilon. La artikoloj en JEFO-Informas reliefigas la vidpunkton de ties aŭtoroj, ne nepre tiun de JEFO. Tamen JEFO decidas ĉu publikigi aŭ ne tiujn artikolojn. Represajoj estas permesitaj, kondiĉe ke oni indiku la nomon de la aŭtoro aŭ la fonton, kaj ke JEFO estu informita.



KION SIGNIFAS AS ? (ENKETO FAR AASS (ASOCIO POR AS-SCIO))

ĈU AERPILKA STARIGADO ?



ĈU ANTAŬPORDA SPORTUMADO ?





ĈU AMASA SURTABLIGO ?

DUM AS, ONI PRETIGAS MANGAĴON.



SUB SUPERRIGARDO DE KUIREJANARO.

LA PANO ESTU SUB
LA ŜINKO, KAJ NE
INVERSE !

HI HI HI



KAJ POST FINPRETIGADO DE LA TABLEGOJ...



ONI IRAS KRUI EN ALIA ĈAMBRO.



ĈU AKORDIONA SEKVADO ?

DUM AS, GITARISTOJ SEKVAS AKORDIONISTOJN.

SEKVI MIN.



SEKVI MIN.





ĈU AMBAŬMONDA SPIRITUMADO ?

DUM AS, ONI FORFLUGAS PER TEUMADO.



MI PRETAS !



KIA BONA
TEO...



NUN MI VIDAS
LA STELON...

ĈU AMKANTA SOL-ŜNURŜANĜO ?

DUM AS, ONI AMKANTE ŜANĜAS LA SOL-ŜNURON.



La Beluliiiin'!...

ĈU AĈVORTLUDA STULTUMADO ?

DUM AS, NE ESTIS JAPANO
SED ESTIS JA PANO.



ĈU ARTFAJRA SALTŜPRUCADO ?

DUM AS, FAJRO ŜPRUCAS.



ĈU AER- SPIRADON ?

DUM AS, ONI FOJE SPIRAS EKSTERAN AERON.



ĈU AKORDIONA STILO ?

DUM AS, ĈIUJ LUDAS AKORDIONON.



ĈU ARDOPLENA SONIGADO ?

DUM AS, DJ-OJ ESTAS NELACIGEBLAJ.



ĈU AMIKTOSTA SEMAJNO ?

DUM AS, FACILAS TROVI IUN POR AMIKE TOSTI.



AŬ TUTSIMPLE, ĈU AS SIGNIFAS AMIK-STRATO ?

